

# Kataluna Esperantisto



NUMERO 334 (100)  
KVINA EPOKO  
APRIL- JUNIO 2005

*Budoj, informiloj,  
prezentadoj ...*

*Someraj intensivaj  
kursoj*

*Renkontiĝo en  
Vilafranca de Conflent*

*Festoj en Vilanova  
i la Geltrú*

*KEJ denove ekmarŝas*

*Història del Kataluna  
Esperantisto*

*Llengües moren alhora*



**curso  
d'estiu,  
fullets,  
xerrades,  
paradetes ...**



**La cent numeroj de la nuna Kataluna Esperantisto estas konvencia festodato se ni konsideras ke ekzistas kontinueco inter Kataluna Esperantista Federacio kaj Kataluna Esperanto-Asocio**

**J**ubileo estis ofte sufiĉe konvenciaj. Pasintjare katalunoj jubileis okaze de la fondo antaŭ cent jaroj de la unuaj esperanto-grupoj, tamen ni agnosku, ke temis pri sufiĉe konvencia dato por festi: eblus fiksi la cent-jariĝon de la kataluna esperanto-movado laŭ la unua artikolo pri esperanto (1898) aŭ okaze de la unua poŝtkarto en esperanto (ricevita de kataluno: 1896; skribita de kataluno: 1899) ktp. Tamen jubileo permesas retrorigardon, per kiu oni akiras pli larĝan perspektivon, kaj pligliatigas la analizon de la nunaj okazaĵoj kaj la planadon de la estonta agado.

Ankaŭ la cent numeroj de la nuna, kvina, periodo de Kataluna Esperantisto estas iagrade konvencia festodato, se ni konsideras –kaj ni ja deziras tiel fari–, ke ekzistas kontinueco inter Kataluna Esperantista Federacio kaj la antaŭmilita esperanto-movado, kaj Kataluna Esperanto-Asocio kaj la nuna esperantismo. Tial la numero, kiun vi tenas ĉe-mane, estas ne pli ol la 334a livero de nia 96-jara periodaĵo.

Sed la okazon ni pretas uzi por memori al ni nian pasintecon. Estas utile, danke al Francesc Poblet, legi pri la flusa kaj malflusa vivo de la antaŭmilita movado en nia lando, kaj ĝia forta ligo kun libereco kaj demokratio. Kaj, helpe de Ramon Perera kaj Txurrubiu, ni povas analizi nian pli proksiman pasintecon per la trarigardo de la lastaj 99 numeroj de nia revuo.

Ĉi tiu analizo estos des pli interesa por nova generacio de esperantistoj, kiu pli kaj pli klare videblas danke al la ret-kursoj, gazetara agado, oftigantaj aranĝoj kaj plimultiĝantaj budoj kaj prezentoj. Denove en ĉi tiu numero vi povos legi, pli mallonge pro la longeco de la tri ĉefaj artikoloj, pri nia bunta agado. Indas substreki la plioftigantajn prezentojn, pri kiuj kelkaj jam rimarkinde bone spertiĝas, kaj la du intensivaj kursoj en Sabadell kaj Mataró.

Laste, sed ne balaste, bone notu la diversajn septembrajn aranĝojn, el kiuj plej elstaras la renkontiĝo en Barcelono, la 16an, 17an kaj 18an. Bonvolu tuj aliĝi!

Hektor Alos i Font

**Alvenis**

La 22an de majo naskiĝis Izarbe Marín Antón. Ni gratulas la gepatrojn Ferran kaj Marián kaj la fratino Ixeya.

En ĉi tiu numero kunlaboris: Carles Verdugo, Christian Pinard, Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Gerard Escuer, Guillem Portell, István Ertl, Joan Català, Joan Inglada, Joan Ramon Guiñón, Pedro Martín, Ramon Perera kaj Txurrubiu.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785  
 Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
 08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio  
 Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org  
 Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org  
 Ret-listo: nia\_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2005: Individua Abonanta Membro 36 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 72 eŭroj; Individua Dumviva Membro 720 eŭroj; Kolektiva Membro 72 eŭroj; Juna Membro 24 eŭroj.  
 Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell,

Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053  
 IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053  
 Konto UEA: kea-b  
 CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Òscar Puig; komitatanoj: Arnau Massanes, Libert Puig, Mateu Vic, Neus Moly, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Sylvie Roques.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

## Bud-maratono

Fine de aprilo kaj komence de majo okazis surstrata budmaratono. Dum la librotago, la 23an de aprilo, KEA organizis tuttagan budon en Barcelono kaj, kunlabore kun la loka esperanto-centro, en Sabadell. Ĉi-jare, danke al kunlaboro kun la sindikato CNT, esperantaĵoj estis proponitaj ankaŭ en Mataró [bv. legi ĉi sube]. Danke al la akirita sperto dum la pasinta jaro, kiam por la unua fojo de jaroj, oni starigis budon en Barcelono, tre senteble pliboniĝis vendado kaj la kvanto da senpage distribuita materialo larĝe superis la prognozojn.

En la sekva semajnfino, denove Centro de Esperanto Sabadell starigis budon en t.n. Tero-Foiro, kaj denove CNT-Mataró, okaze de la labortago, svingis tol-afiŝon en esperanto kaj la kataluna dum la barcelona manifestacio kaj distribuis esperanto-flugfoliojn.

Estas planata nova budo en Barcelono, en la asoci-foiro ĉiujare organizata en la Citadel-parko dum la nacia tago, la 11an de septembro. Per tio, ripetiĝos la tre kontentiga pasintjara sperto.

## Kvar novaj informiloj

Okaze de la librotago, nia asocio eldonis du novajn flugfoliojn en po 2000 ekzempleroj. Unu -blanka, verda kaj nigra- per alloga



prezento klarigas pri la lingvo. La dua baziĝas sur nova koncepto: ĝi celas nur kapti la atenton de preterpasantoj. Temas pri tutkolora karteto, en kiu unuflanke staras foto de du knabinoj -unu ĉin-aspekta, la alia eŭropeca- kaj sur la alia videblas nur la nomo de la asocio kaj la ret-paĝo. La unua estis preskaŭ entute disdonita dum la librotago, dum la dua estis ĉefe distribuita en diversaj junularaj renkontiĝejoj en Barcelono (asocioj, trinkejoj k.s.).

Krome, post la konstato de furora interesiĝo pri libraj paĝ-indikiloj dum la pasint-jara librotago, estis kreita nova, tre plaĉa, kun la

## Surstrate en Mataró

La anarki-sidikatisma kaj anarkiisma movadeto en Mataró subtenas la internacian lingvon, kaj klopodas diskonigi esperanton dum sia propaganda agado.

Jam antaŭ kelkaj monatoj komenciĝis kurso kunorganizita de la mataroa anarki-sindikato kaj KEA, kaj plej eble vi memoras pri la pasinta renokontiĝo en ĉi-lastata urbo.

Dum la librotago, la sindikatanoj disvendis diversajn aĵojn rilatajn al esperanto en surstrata budo. Krom pluraj anarkiismaj libroj kaj la tipaj rozoj,

ankaŭ aĉetebles vortaretoj, kursetoj, legolibroj por komencantoj, kaj libroj pri la lingvo mem.

La plej rimarkindaj kaj interesaj esperantaĵoj, kiujn oni aĉetis, estis la libro "Esperanto: lengua y cultura" far Antonio Valén, la fama vortareto eldonita de KEA "Diccionari Essencial esperanto-català" far Alòs kaj Carbonell, kaj la lernolibro de KEA. Ankaŭ estis venditaj sufiĉe multaj plurmediaj KD-oj eldonitaj de KEA.

La 1an majo, la mataroaj kamaradoj partoprenantaj la manifestacion orga-

nizitan de la Kataluna-Baleara Labor-Konfederacio kunportis kaj altigis panelon, en kiu legeblis "Nek interpopola milito, nek interklasa paco", kaj en la internacia kaj en la kataluna lingvo.

Krome, dum la manifestacio estis disdonataj flugfolioj eldonitaj de la anarkiisma grupo Encert, kiuj ankaŭ legeblis en esperanto.

Certe ni daŭrigos nian agadon por la internacia komunikilo, kaj ni nepre informos vin pri la venontaj kontribuoj.

Carles Verdugo



## KEJ denove ekmarŝas

La marta renkontiĝo en Mataró fariĝis turnopunkto en la historio de KEJ. La junulara kunveno tie okazinta lanĉis novan retliston, kie i.a. organizaj temoj estas pritraktataj. El ĝi sekvas la reordigo de la asocia dosiero ĉe la kataluna registaro, en majo, kiu permesos petadon de subvencioj. Novan kunvenon oni planas dum la pola IJK, kie antaŭvideble estos elektita nova estraro. Aliaj organizaj ŝanĝoj survojas, kaj la septembra renkontiĝo, kun forta junulara karaktero, antaŭvideble estos plia ŝtupo en tiu nova etapo de KEJ.

sama teksto en ambaŭ flankoj, en esperanto kaj la kataluna. Ĝiaj mil ekzempleroj plene distribuiĝis dum la librotago.

Laste, la pasintjara KD kun esperanto-materialoj estis refasonita, kaj ĝia enhavo - plibonigita kaj aktualigita. Ankaŭ la prezono oni draste malaltigis, pro kost-malaltigo danke al la pasintjara sperto, tiel ke ĝi fariĝis la vendo de la librotago: cent ekzempleroj disvendiĝis.


## Prezentoj de esperanto en Mataró, Vilanova kaj Barcelono

Josep Maria Milla kaj Ferriol Macip prezentis esperanton dum du horoj la 21an aprilo al trideko da lernantoj de la lernejo Sant Josep en Mataró. Ili enkondukis la historion de la lingvo, prezentis elementajn lingvajn ekzercojn pri finaĵoj, afiksoj kaj kunmetitaj vortoj, kaj ĉe la fino klarigis pri la nuna stato de la lingvo, ekz. en muziko kaj literaturo, kaj ĝiaj praktikaj uz-eblecoj, i.a. en kongresoj kaj per pasporta servo. Temas pri la dua prezento de esperanto en lernejo de Mataró dum la kuranta jaro.

Aliaj prezentoj estis faritaj en Centre Cultural "L'Aixada" de Vilanova i la Geltrú la 4an de junio, fare de Josep Maria Milla, Ferriol Macip kaj Hektor Alos, kaj en la kvartala asocio Cardener de Gràcia la 7an de junio fare de Hèctor Alòs.

## Literatura seminario

La 9an de aprilo okazis en Amikoj de Unesko literatura seminario. La du gvidantoj, Abel Montagut kaj Hektor Alos, kronologie prezentis la literaturon en esperanto: la unua - la poezian, la dua - la prozan. La historion de la esperanto-literaturo oni dividis en kvar periodojn, tiel ke la seminario konsistis en entute ok duon-horaj ĉapitroj. Partoprenis la aranĝon kvin homoj kaj la gvidantoj transdonis buntan teksto-specimenaron kaj bibliografion.



La junia numero de la revuo *Lletres* publikas longan intervjuon de nia samasocio Francesc Poblet al la prezidanto de ERC, parlamentano kaj filologo Josep-Lluís Carod Rovira. Ĝi okazis en la Parlamento de Katalunio kaj dum ĝi li ricevis la libron *La komenco de la esperantomovado en Katalunio*, kiun li ricevis kun granda intereso. Lin surprizis kaj ĝojigis la kvalito de la eldono, same kiel la internacia disvastigo, kiun KEA faras de tiu parto de nia nacia kulturo.

Foto: Teresa Torrejón i Alabau

## Esperanto en la Nacia Muzeo pri Historio

La 17an de marto antaŭ preskaŭ cent-homa publiko estis prezentita en la Nacia Muzeo pri Historio la dulingva lingvo *Els inicis del moviment esperantista a Catalunya / La komenco de la esperanto-movado en Katalunio* de la historiisto Francesc Poblet. La libron prezentis la aŭtoro mem, post kio la sekretario de KEA, Hektor Alos, prelegis pri “esperanto hodiaŭ”.

## Renkontiĝo en Vilafranca de Conflent

Preskaŭ tridek homoj partoprenis dum la 7a kaj 8a de majo la renkontiĝon en Vilafranca de Conflent. Konstraste kun la antaŭa aranĝo en Mataró, la organizantoj, KEA kaj Esperanto-Conflent, decidis iompli “trankvilan” aranĝon, en kiu promenadoj en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj grave rolis. Krome lingvaj atelieretoj kaj ludoj kaj movada “cerboŝtormo” aldonis al la aranĝo ĝian klasikan karakteron, parte instruon, parte praktikan.

La venonta renkontiĝo, okazonta la 16an, 17an kaj 18an de septembro en Barcelono (vidu la kovrilan anoncon).

## Festo por Majstro Martí

Okaze de la 25-jariĝo de la fanfaro Banda Puig, la 3an de junio la urbo Vilanova i la Geltrú aranĝis feston omaĝe al sia dirigento Oscar Martí. Ĉar ankaŭ dum 25 jaroj li estis membro de la koruso Orfeo Vilanoví kaj ĝia anstataŭa estro, la omaĝo konsistis el komuna koncerto de tri korusoj kaj fanfaro. Ĝia kulmino estis la komuna interpretado de la himno de esperanto, La Espero. Tiu fakto estis citita dum tri sinsekvaj numeroj en la loka semajna gazeto *Diari de Vilanova*, same kiel de la ĵurnalo *El Punt*, kaj ĝi estis bone klarigita antaŭ ĝia interpretado dum la koncerto.

Inter 1934 kaj 1936 Oscar Martí lernis esperanton en Vilanova de la mult-flankaj aktivulinoj Teresa kaj Eulàlia Rosell, kiujn la urbo omaĝis en la pasinta decembro. La kursojn li devis forlasi por partopreni en la defendo de la respubliko dum la tri-jara



*Trankvila vespera rondo en Vilafranca de Conflent*

Hispana Milito. Li mem rakontas: “Estis multaj homoj lernantaj esperanton. [Post la malsukceso, en 1939,] en franca koncentrejo mi ekludis la himnon per klariono. Aŭdis min muzikisto kaj li venis serĉi min. Estis multaj esperantistoj.” De tiam La Espero ekhavis apartan signifon por li.

## Intensivaj kursoj en Sabadell kaj Mataró

La 17an, 18an kaj 19an de junio okazos en Sabadell intensiva kurso de esperanto gvidita

*Kunkantado de “La Espero” en Vilanova i la Geltrú. Foto: Carles Castro*





*Jomo Milla kaj Xevi Rodon prezentas la okazontan esperanto-kurson en Mataró dum la pasinta novembro.*

de Éric Collignon. Siavice, en la mardaj kaj ĵaŭdaj tagoj de julio okazos en Mataró vespera intensiva kurso kun Josep Maria Milla kaj Ferriol Macip kiel instruistoj.

### **Esperanto kaj anarkiismo**

Danke al la intensiva kunlaborado dum la tuta jaro inter KEA kaj la ĉelo de la sindikato CNT en Mataró, inter aliaj per eksterordinare sukcesaj kurso kaj renkontiĝo, ĉi tiuj dissendis cirkuleron al siaj kolegoj en Sud-Katalunio kaj Balearoj. Ĝi akompanis leteron de KEA, per kiu nia asocio proponis siajn servojn por esperanto-kursoj, kaj resume prezentis la fruktodonan kunlaboron inter la du asocioj. La unua reago estis la invito de la grupo de Igualada por artikolo en la liberacana jarlibro, kiun ĝi redaktas, kaj kiu antaŭvideble estos baldaŭ eldonita.

### **Esperanto en RAC 1**

Manel Vinyals kaj Hèctor Alòs gastis la 28an de marto, Paskan London, en la programo Via Lliure de la elsendejo RAC1. En duonhora amika babilado kun la gvidantino, ili ŝpinis la kialojn de la ekzisto de esperanto, ĝian praktikan utilon kaj la nunan vigecon de la lingvo. Venis ankaŭ du telefonvokoj de aŭskultantoj kun konkretaj demandoj pri la lingvo.

### **TTT-ejoj de CES kaj KTP**

Centro de Esperanto Sabadell denove funkciigis sian TTT-ejon [www.esperanto-](http://www.esperanto-ct.org/sabadell)

[ct.org/sabadell](http://www.esperanto-ct.org/sabadell). La prezento estas simpla, sed en ĝi legeblas bazaj informoj pri pasintaj aŭ okazontaj aranĝoj. Prizorgas ĝin Dani Rubió. Ankaŭ la muzikensemblo Kaj Tiel Plu plene renovigis sian paĝaron ĉe [www.esperanto-ct.org/kajtielplu/index.html](http://www.esperanto-ct.org/kajtielplu/index.html). Ĝin fasonis Felip Artero.

### **Skolta TTT-ejo en esperanto**

Nia estrarano Ramon Perera tradukis al esperanto la prezentajn informojn de la retpaĝaro de Escoltes Catalans, la kataluna skolta movado. Per tio la TTT-ejo, [www.escoltes.org](http://www.escoltes.org), estas kvarlingva: en la kataluna, hispana, angla kaj esperanto.

Indas mencii ankaŭ la tradukon al la kataluna de la TTT-ejo pri la IJK fare de Joan Català, el Valencilando ([www.tejo.org/ijk/2005/cxefa.php?lingvo=ct](http://www.tejo.org/ijk/2005/cxefa.php?lingvo=ct)).

### **Verdaj politikistoj en esperanto**

Ekologiismaj esperantistoj, kunordigitaj de la franca aktivulino Corinne Daudier, kreis multlingvan TTT-ejon pri la verdaj eŭrope-deputitoj ĉe [ikso.net/verduloj/testo-onesta](http://ikso.net/verduloj/testo-onesta). La tri tiugrupaj deputitoj el la hispana ŝtato estas el la Kataluna Landaro, tiel ke KEA helpis en la traduko al esperanto de la sinprezentoj de Bernat Joan i Marí (Esquerra Republicana de Catalunya) kaj David Hammerstein (Esquerra Unida del País Valencià), speciale petitaj por la TTT-ejo. La ĉefan traduk-taskon faris Guillem Portell.

## KTP koncertadas

Post sia sukcesa prezento en la barcelona Plaça del Rei, Kaj Tiel Plu koncertis paske dum la Internacia Junulara Festivalo en Lido di Jesolo (Venetio) kaj la 28an de majo, en la urbodoma placo de Mataró, en loka Festo de la Justa Komerco. La 7an de julio, ĝi malfermos en La Farinera de El Clot (Barcelono) la 1an Renkontiĝon pri Ĉiea Tradicia Muziko.

## Recenzoj

En la ĵurnalo *Avui* la 5an de marto kaj la 21an de junio en la katalunlingva suplemento *Quadern de El País* aperis recenzo pri la libro *Odieu-vos els uns als altres* de Manuel de Seabra. Alia libro raportita en nia antaŭa numero, *Les set tribus de la nació catalana* de Jordi Solé i Camardons, meritis recenzojn en la semajngazeto *Presència* kaj la revuo *Lletres*.

## Artikolo en La Ondo

Hektor Alos publikigis kvar-paĝan eseon pri Katalunio en la revuo *La Ondo de Esperanto*, en serio de prilandaj artikoloj decembre

inaŭgurita per artikolo pri Nord-Osetio. Post ioma diskuto pri la difino de Katalunio kaj kataluneco, la aŭtoro trarigardas la historion, la arton kaj literaturon, la nuntempan politikan debaton kaj sociajn zorgojn, ĝis li finas pri moroj kaj popolfestoj. La artikolon akompanas diversaj fotoj kaj tabeloj, same kiel la poemo “Provo de kantiko en la templo”, en la kataluna originalo kaj esperanta traduko de R. F. Albert Reyna.

La sama aŭtoro publikigis en la marta numero de *Monato* artikolon sub la titolo “Pri kato, rato, ŝtato – kaj azeno”, pri la diversaj bestoj uzataj nialande kiel naciaj simboloj. Granda foto de azeno plenigis la frontpaĝon de la revuo. En la aprila numero Alos aŭtoras pli mallongan artikolon pri ventoenergio.

## Katalunaj Monato kaj Jarlibro

Post kelkatempa kunlaborado Ferriol Macip transprenis la kompostadon de la tuta revuo *Monato* ekde la marta numero. Lia stilo, malgraŭ kontinueco en la revuo, estas rimarkebla kaj meritis laŭdojn de kunlaborantoj kaj legantoj. Ĝi ne estis preteratentita de UEA, kiu petis al li la frontpaĝon de la Jarlibro de 2005, nuntempe presata.



## Joan Bruno, centjara

*Nia dojeno, Joan Bruno centjariĝis. Por lin omaĝi la 4an de junio, kuniĝis 25 esperantistoj en vigla tagmanĝo en la impona sidejo de Foment Vilanoví. Jen la teksto legita de Joan Inglada dum la aranĝo:*

Ni estas ĉi tie por soleni tute ne oftan eventon. Ne okazas ĉiutage ke iu centjariĝas kaj eĉ malpli ofte, ke esperantisto cenjariĝas. Sinjoro Joan Bruno estis la instruisto de esperanto en la Vilanova Esperanto-Grupo, kiam mi ekesperantiĝis antaŭ sufiĉe multe da tempo. Li estas studema homo pri multaj fakoj, inter ili lingvoj kaj konkrete li ŝatas la gramatikaĵojn. Li konas la germanan, la anglan, la francan, la italan kaj, kompreneble, esperanton, la katalunan kaj la

hispanan. Li de multaj jaroj kaj ankoraŭ nun dediĉas po unu tagon semajne por ĉiu lingvo, kiun li konas. Li legadas la klasikulojn de tiuj lingvoj. Li korespondis kun esperantaj gramatikuloj, inter ili kun s-ro Mimó el Sabadell. Krom la lingvojn li treege amas matematikon. Mi ankoraŭ memoras, kiam li parolis al mi pri la solvo de multradikaj ekvacioj kaj pri aliaj matematikaĵoj, ĉar tiutempe mi ankoraŭ havis iomete freŝaj tiajn aferojn.

Aparte ni devas mencii, ke li estis kaj estas tre diskreta homo. Li ne estas granda aktivisto, li ne sin dediĉis al varbado, sed kiel formiko li laboris silente kaj ĉeestis la kursojn de esperanto en nia vilanova grupo por

esti ĉiam preta helpi la lernantojn pri la gramatikaj demandoj. En la direkto de tiu diskreteco li estas protektanta membro de KEA kaj de aliaj esperantaj asocioj. Pro sia diskreteco li ne estas multe konata kaj des malpli de la plej junaj esperantistoj sed tiuj, kiuj konas lin, memoras, kiam li ĉeestis multajn esperantistajn aranĝojn eĉ antaŭ nemulte, kiel la cenjariĝan jubileon de nia forpasinta s-ro Gumà.

Pro tio ni estas kune ĉi tie por danki lin pro tio, kion mi diris, por gratuli lin kaj lian familion pro la granda homo, kiu estas nia tre estimata esperantisto s-ro Joan Bruno. Gratulojn nome de Kataluna Esperanto-Asocio.

# Niaj proverboj (kaj 4)

*Pedro Martín Burutxaga*

Jam venis fino al mia latino. Hodiaŭ mi havas nur viajn sugestitajn tradukojn al la lastaj proverboj proponitaj de mi. Ĉi-okaze ni ricevis lavangon da sugestoj, dankon al ĉiuj. Jen ili:

**De Joans, Joseps i ases n'hi ha per totes les cases**

- Johanojn, Jozefojn kaj azenojn havas ĉiuj bienoj
- Peĉjoj kaj feĉoj - en ĉiuj breĉoj
- Petroj, Paŭloj kaj bufonoj estas en ĉiuj domoj
- Veteraneco, saĝo kaj malscio troviĝas en ĉiu asocio

**La merda com més es remena, més put**

- Ju pli fekon oni fosas, des pli ĝi fetoras

- Ju pli fekon oni svingas, des pli stinke ĝi stinkas
- Ju pli merdon vi esploras, des pli ĝi fetoras
- Ju pli oni merdon pikas, des pli ĝi fetoras
- Ju pli oni merdon skuas des pli ĝi fetoras

**El carall, quan està tret, tot ho admet**  
(origina signifo: dum seksa ekscitiĝo viroj ne estas tre selektemaj)

- Ju pli pranca, malpli nuanca
- Kac' falusa, kokin' misuza
- Kaco levita, ĉio elektita
- Kaco staranta, ĉion boranta
- Kiam kaco alte tajdas, viroj ĉion rajdas
- Kiam kaco falusas, ĉiu ingo validas
- Kiu prancas, tiu ĉion lancas
- Piĉ' malseka, fiko greka

- Piĉo gutas, kac' bongustas
- Piĉo jukas, voĉo flutas
- Piĉo likas, Peĉjo fikas
- Piĉo likas, Penjo midzas
- Piĉo suka, ĉion glutas
- Se staras falus', eĉ taŭgas seruro por uz'

Restas al mi nur danki viajn atentan legadon kaj kunlaboron kaj kuraĝigi vin uzi esperantajn proverbojn kaj eĉ krei ilin, ja "venas proverbo el popola la cerbo", kaj ni ĉiuj estas tiu popolo esperanta.

Sed ne troigu, ĉar "homo proverbema – fripono kaj mallaborema" (mia traduko el la kataluna "home refranyer, gos i mal feiner"). □

## Muzik-recenzoj

*Joan Català*

**Esperanto kaj popola kulturo**

Bonvenon en la okcitanan kaj katalunan mezepokon! Per la muziko de Kaj Tiel Plu oni povas facile vojaĝi tra kampoj kaj montaroj de Okcitanio, tra riveroj kaj lagoj de Katalunio, kaj ankaŭ ĝis la kamparanaj teroj de Andaluzio, ĉar ĉiuj kantoj apartenas al popola aŭ folkloro kulturo de tiuj landoj. En siaj kantoj ili uzas esperanton kaj latinon tre originale kaj kuraĝe. Krome, ili ludas multe da malsamaj akustikaj instrumentoj.

Kaj Tiel Plu pruvas, ke oni povas miksi esperanton kun popola kulturo. Tio funkcias bonege.

Kaj Tiel Plu. *Plaças al mi*. Vinilkosmo. Donavila, 2004. 17,40 €

**Montrinda stil-miksaĵo**

Strika Tango havas bonan muzikan kvaliton. Ĝi miksas *ska* kun popmuziko, ankaŭ iom da rokmuziko kaj diversajn aliajn stilojn. Mi ĝuis ĝiajn kantojn, kun ĝiaj trumpetoj kaj gitaroj kaj kun ĉiuj melodioj. La KD *Civilizacio* enhavas 16 bonajn kantojn, kiujn vi ŝatos. La grupo scias, kiel miksi malrapidajn ritmojn kun belaj dolĉaj voĉmelodioj.

Ili kantas en esperanto per tute klara kaj bona prononco. Mi povas aŭdi la muzikon, aŭskulti la perkut-instrumentojn kaj samtempe kompreni tion, kion la kantisto diras.

Tre rekomendindas por montri al viaj amikoj, ke ekzistas muziko en esperanto.

Strika Tango. *Civilizacio*. Vinilkosmo, Donavila, 2004. 18,90 €

**Bona etoso – misprononco**

Mi ŝatis la muzikon kaj la arton de la kantisto Ĵak le Puil. Aŭskultante lin, oni povas senti bonan etoson. Lia muziko estas bele akustika. Mi ŝatis lian voĉon kaj la sonon de lia gitaro. Sed mi ne ŝatis lian prononcon, pro lia ĉiama forta franca akĉento... kaj tio estas maltaŭga por homoj ne parolantaj esperanton, kaj ankaŭ por komencantoj.

La kantisto havas amuzajn ideojn, li kantas rapide kaj spontane.

Ĵak le Puil. *Mi estas*. Vinilkosmo, Donavila, 2004. 19,80 €



# Nova Kataluna Esperantisto centnumera (1982–2005)

Ramon Perera

En 1982, jam post la falo de la frankisma reĝimo, fondiĝis Kataluna Esperanto-Asocio (KEA), fakta heredanto de Kataluna Esperantista Federacio (KEF), malaperinta pli ol 40 jarojn antaŭe pro la faŝisma puĉo en Hispanio. Jam dum ĝia provizora ekzisto, antaŭ ĝia oficialigo (en la samjara septembro), la asocio reprenis la eldonadon de *Kataluna Esperantisto* (junio 1982). Siatempe ĝi estis bulteno eldonita de KEF kaj la oficiala organo de la Federacio. KEA adoptis la samajn frontispicon, dimensiojn kaj numeradon; tial la bulteno fariĝis la 234a de la ĝenerala serio.

La komenciĝo, kompreneble, ne estis facila kaj la sekva numero aperis nur unu jaron poste (junio 1983). Intertempe, tamen, la asocio ne restis senaga kaj jam estis organizinta la 22ajn Internaciajn Florajn Ludojn kaj la 24an Katalunan Esperanto-Renkontiĝon (septembro 1982). Same en septembro KEA estis oficiale registrita, kaj en la sekva monato marto okazis la unua ordinara asembleo, dum kiu oni elektis novajn Plenumkomitaton kaj Kontrolan Komisionon.

Ankoraŭ en 1983 aperis alia numero kaj de tiam ĝis la nuntempo la aperado iĝis seninterrompa krom kelkaj sporadaj malregulaĵoj en la aperritmo ŝulditaj al la naturaj baraktadoj de la asocia vivo aŭ al provizoraj mankoj de laborfortoj. La ritmo stabiligis inter kvar kaj ses numeroj en jaro, kun 3 jaroj kun tri kaj 2 kun kvin.

En decembro 1983, KE informas pri la 19a Kataluna Kongreso de Esperanto (la unua post la hispana intercivitana milito), okazinta en Sabadell du monatojn antaŭe. Ĝi surportis ankaŭ la titolon 25a Jubilea Renkontiĝo de Katalunaj Esperantistoj. Tiel finiĝis la periodo komenciĝinta tuj post la fino de la milito, kiam la diktaturo, post la komenca maltolero de io ajn esperanta, malpermesis al la katalunaj esperantistoj kongresi kaj ili devis, do, “renkontiĝi”.

La unuaj numeroj de KE traktas pri temoj kiuj, pli aŭ malpli regule, daŭre aperos estonte: Katalunaj Kongresoj, Internaciaj Floraj Ludoj, internaciaj agadoj kaj renkontiĝoj, eldonaĵoj de KEA, recenzoj pri libroj, lingvaj ludoj aŭ konkursoj, ktp. La sekretaria raporto de 1983 mencias, inter aliaj: internaciajn rilatojn, Katalunajn Landojn, pedagogian komisionon, perkorespondan kurson.

La numero 240a estas plurkiale notinda. Unuavice pro deklaro de la plenumkomitato de KEA rifuzanta strangan proponon de la ĝistiam prezidantino de HEF, nome, fariĝi gvidantoj kaj sidejo de Hispana Esperanto-Federacio. Pli videble (kaj kun malpli granda politika signifo), la dimensio de la bulteno ŝanĝiĝis de la kutima 16x22 cm (simila al A5) al 22,3x32 cm (iom pli granda ol A4). Ne diskuteble, la nova formato donas novan karakteron al la eldonaĵo. La grandformatecon, kun iom da ŝanceliĝo en la konkretaj dimensioj, *Kataluna Esperantisto* daŭre konservas ĝis la adopto de la nuna A4, kiu estas plene moderna.

Tiu sama numero estas la unua (post la 235a) uzanta rimedon, kiu poste fariĝos grava: aperadon de teksto sur la kovrilo. Komence nur ĝis la numero 243a kaj poste ekde 325 (januaro-marto 2003) ĝis la nuno. La temoj traktitaj daŭre celas nur movadanojn kaj kvankam en la fina numero de la jaro 1985 oni promesas novan sekcion “por diskonigi la Internacian Lingvon al katalunlingvanoj”, necesas atendi ĝis la komenco de la jaro 2004 (n-ro 329) por trovi plenan realigon de



NI  
PLUE  
IRAS  
LA  
VOJONI

***Kataluna Esperantisto  
adoptis la samajn  
frontispicon,  
dimensiojn  
kaj numeradon***

la promeso, eĉ kun du novaj plusoj: traktado de sociaj aspektoj kaj apero en la kovrilo.

La kutimaj temoj daŭre regis la enhavon de la gazeto, eĉ kiam ĝi reeĥis la baraktojn interne de la asocio. Tiel, la numero 276 (septembro-oktobro 1991), ĵus antaŭ la kongreso en Taragono, asertas: “ni ekplanu nepran reorganizon”. La tuta afero verŝajne markas unu el la plej gravaj ŝanĝiĝoj en la postmilita periodo de la asocio.

Neofte, meze de la bunta artikolaro, aperas skribaĵo aparte notinda. Tiel okazas en junio 1994 per artikolo en la kataluna lingvo pri la informadaj politikoj de neregistraj organizoj, kun atento al la kazo “esperanto en Katalunio”. Nur iom post iom renovigo de la temoj realiĝas, kiel atestas la numero de junio 1999, informante pri la seminario organizita de KEA “La lingva problemo en la Eŭropa Unio”, kun la partopreno de reprezentantoj de la katalunaj politikaj partioj. En tiu sama bulteno oni informas pri la agado de katalunaj esperantistoj por helpi la rekonstruon de la milite detruita Bosnio.

En decembro 1999 oni informas pri la sekvoj de fama eksterordinara asembleo okazinta dum la kongreso en Manresa. Okazis kvazaŭ la revolucio de majo 1968 en Parizo: dum certa tempo ŝajnis, ke la tuta

asocio estos renversita kaj fine la efiko estis multe malpli granda; la plej videbla sekvo de tiuj faktoj estis la naskiĝo la retlisto de katalunaj esperantistoj, “nia\_listo”.

Necesas atendi ĝis la jaro 2003 por trovi la komenciĝon de daŭra kaj kohera renoviĝo de la temoj, kio fontas de ne banala evoluo en la asocio mem. Tia evoluo multon ŝuldas al la “okazaĵoj de Manresa”. La renovigo estas evidenta en la ŝanĝo de la frontispico, en la apero de teksto en la titolpaĝo kaj en la enhavo de la foto unuapaĝa (manifestacio kontraŭ la milito en Irako). Sed precipe la nova sinteno sin montras per la signifo de la citita teksto: la titolo, “Kun la socio, kontraŭ la milito, por la libero de esprimo” kaj la unua frazo, “Nia asocio deziras esti socie aktiva kaj nete malneŭtrala, kiam oni lezas la homajn kaj lingvaj rajtojn.”

Post tiu superrigardo al la lastaj 23 jaroj de *Kataluna Esperantisto*, oni povas vidi kiel malsama estis ĝia vivo kompare kun la antaŭmilitaj jaroj: la lando restis politike stabila kaj la karaktero, evoluo kaj ŝanĝiĝoj de la aperritmo fontas nur de la interna vivo de la asocio kaj ne de la politikaj kondiĉoj de la lando: diktaturo, persekutoj ktp (eĉ la ĝermo de puĉo en februaro 1981 restas ekster la periodo). La estonto sidas en la manoj de la nunaj movadanoj, ne malgranda respondeco! □

***Okazis kvazaŭ  
la revolucio  
de majo 1968 en  
Parizo: dum certa  
tempo ŝajnis, ke la tuta  
asocio estos renversita***

***La lagado-konkurso:  
ĉu ekzerca ludo... aŭ luda ekzerco?***

**K**iel ofte ĉe tiuj, kiuj gvidas kursojn pri Esperanto, mi ĉiam serĉas novajn metodojn por lernigi amuze aŭ lude la misterojn de nia lingvo, celante tiel igi allogaj la kursojn. Ekde la unua konkurso, mi uzis ĝin kiel ekzercon por la lernantoj. Ne temas tiam pri gramatiko sed pri vortara serĉado, kaj tiu luda ekzerco tre plaĉis al miaj gelernantoj, multe pli ol la lernado de longaj vortolistoj...

Mi proponas do al la aliaj instruantoj, ke ili agu same, instigante tiel la grupojn starigi apartan

konkurson inter si. La tempo inter du konkursoj, preskaŭ tri monatoj, ebligas trovi tempon ene de la ritmo de la instruado por tion fari, kaj la regulo de la konkurso igas reale venkon de ĉiu partoprenanta grupo. Eble ankaŭ speciala premio -vortaro, ekzemple- allogus pli da grupoj (tute neŭtrale dirite, sinjoro kasisto ;-) !) Kiel iu moderna grafo De Coubertin, mi do rediras: la ĉefa afero estas partopreni! Eĉ se, en nia verda mondo, ĉiu iam gajnos!

Christian Pinard

# Rigardo al la vojo irita: cent pliaj Katalunaj Esperantistoj!

*Txurrubiu*


*“Neniu homgrupiĝo povas esti neŭtrala  
pri ĉio – se ne, ĝi ne ekzistus.”*

Jen gravaj vortoj de Michel Duc Goninaz aperintaj en Kataluna Esperantisto<sup>1</sup>. Kataluna Esperantisto montras la malneŭtralecon de nia asocio, la kialon de nia ekzistorajto. Post 27-jara aperado, fine de 1936, la numero 232-233 de nia revuo parolis pri “halto sur la vojo” pro la bedaŭrinda milito, halto daŭranta preskaŭ kvardek ses jarojn. Kun la reveno de la demokratio, jam en 1982, reaperis nia gazeto per la numero 234 kaj la unua prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, Manuel Casanoves i Casals, en sia enkonduka “Ni plue iras la vojon” asertis: “La katalunaj esperantistoj (...) estis duoble suspektindaj: kiel katalunoj, ĉar ili estis defendintaj sian nacian identecon (...); kiel esperantistoj, ĉar Esperanto (...) minacis la imperian karakteron de la kastilia lingvo, laŭ la vidpunkto de la nova reĝimo.” Li finis sian reprenan saluton per la sekvaj vortoj prenitaj el la unua numero, aperinta en 1910:

*“Vi, la eksterlandaj gazetoj, ĉefe la hispanaj, volu ankaŭ akcepti nian sinceran saluton, kaj volu cedi lokon simplan en via honorinda rondo al tiu areto malsperta, juna kaj humila, sed fervora kaj entuziasma, kiu celas, kiel vi, la venkon de Esperanto!”*

Por festi la cent unuajn numerojn de tiu nova epoko, mi provos komentarii kelkajn gravajn enhavojn aŭ ecojn en ili.

La ĉefa celo de la esperantismo estas, kompreneble, solvi la lingvan problemon en la interpopolaj kontaktoj; ĉi respekte estas speciale klariga kaj kortuŝa la atesto de George Lagrange, franco, pri lia ekkompreno de la subpremado al la lingvaj minoritatoj, aperinta en nia bulteno<sup>2</sup>. Permesu al mi, escepte, iom longan citaĵon:



*“Kaj oni instruis al ni, ke la Respubliko estas unueca kaj nedividebla kaj ke ĝia sola lingvo estas la franca. Tial ŝajnis al mi evidente, ke ĉiuj ankoraŭ ekzistantaj dialektoj, ke la aliaj marĝenaj lingvoj de la franca teritorio nature kaj nepre devas malaperi.*

*Tio estis evidentaĵo por miaj dek aŭ dek du jaroj.*

*Ke la korsikanoj parolis italan dialekton, la alzacanoj germanan, ke estis flandroj, katalunoj aŭ vaskoj, ke estis bretonoj kun kelta lingvo, bretonoj, kiuj eĉ ne komprenis la francan, sed kiujn oni amase sendis kontraŭ la germanajn mitralojn dum la unua mondmilito, ke en la sudo oni parolis tute aliajn idiomojn... nur bagateloj. Nu, la lingvajn minoritatojn oni simple ignoris, nome de la Respubliko unueca kaj nedividebla.*

(...)

*Nur tra mia esperantisteco – kaj mi jam estis kvardekjara – mi komprenis la profundan signifon de tiu subpremado al la lingvaj minoritatoj.”*

***Nur tra mia  
esperantisteco  
mi komprenis  
la profundan signifon  
de subpremado  
al la lingvaj minoritatoj***

***Prezenti en la kataluna  
esperantaj originalojn  
estus vera novaĵo***

Foje oni reproduktis artikolojn aperintajn en aliaj publikaĵoj, kio eventuale povintus kaŝi mankon de propraj rimedoj. Tamen, represo de bone elektitaj, selektitaj kaj dozitaj skribaĵoj jam publikigitaj aliloke povus helpi diskonigi la okazintaĵojn kaj novajn ideojn en la esperanta mondo. El inter la antaŭaj okazaĵoj mi volas citi tri:

- artikolo de Miroslav Malovec pri la maniero labori por Esperanto kaj pri la konveno paroli pli pri ĝia utileco ol pri la fina venko<sup>3</sup>;

- skriba prelegeto (tro longa) de Michel Duc Goninaz pri “esperantismo, politiko kaj ‘neŭtraleco’”<sup>4</sup>;

- eseo (terure longa) de Marjorie Boulton pri Salman Rushdie, lia romano *The Satanic Verses* kaj la konflikto kun la islamanoj fanatikaj<sup>5</sup>.

Kvalito kaj varieco troviĝas inter la plej gravaj ecoj de periodaĵo, des pli se temas pri esperanta afero; ambaŭ ecoj partoprenadis en niaj Katalunaj Esperantistoj sed ne ĉiufoje kaj eĉ laŭ malregula maniero. Pro varieco estus bone repreni iamajn rubrikojn. Dum certa periodo prosperis rubrikoj kaj por komencantoj kaj por progresantoj, kun bonaj fragmentoj elektitaj de Gemma Armadans. Ŝajnas al mi, ke tia enhavo estas bona, sed ĉefe la artikoloj devus trakti aktualajn aŭ lokajn temojn, por ke la lingvo fariĝu interesa ilo tiel frue kiel eble.

Tradukitaj beletraĵoj: bela ekzemplo unupaĝa aperas en la numero 274; temas pri rakonto de Pere Calders, adaptita kaj tradukita de Abel Montagut. Eĉ se ne en ĉiu numero, tia iniciato helpus diskonigi nian literaturon eksterlanden kaj instigi ontajn tradukantojn. Aliflanke, prezenti en la kataluna esperantaj originalojn, se mi ne eraras, estus vera novaĵo kaj havus interesan valoron: ĝojigi homojn favorajn al la internacia lingvo kaj laborantajn por ĝi, sed kiuj ne deziras lerni la lingvon aŭ spertas malfacilaĵojn pri ĝi.

Niaj homoj montriĝis klarvidaj rilate la lingvan politikon de Eŭropa Unio: la nuna, definitiva formo de la Eŭropa Konstitucio pravigas la protestojn kaj timojn antaŭe esprimitajn:

- En 1989 la 24a Kataluna Kongreso de Esperanto “protestas pro la ĉefaj linioj de la programo *Lingua*, aprobita (...) de la Ministroj pri Klerigado de la dek du Membro-Ŝtatoj.

Tiu programo sankcias **la ŝtatan oficialecon kiel solan kriterion** por difini kulturen kaj lingvan identecon, kreante per tio precedenton tre danĝeran jure, politike kaj etike” (mia grasigo)<sup>6</sup>;

- Kaj en 1990, kadre de la 7a intergrupa renkontiĝo, okazis la debato “La lingva problemo en la estonta Eŭropa Unuiĝo”. La debato tiel impresis nian samideanon Lluís Armadans, ke li verkis kelkajn skeptikajn versojn sub la titolo “Eŭropo”. El inter ili mi prezentas ĉi specimenon:

Multaj etaj sensignifaj etnoj kompreneble mortos rezignataj; la plej gravaj ŝtatoj jam regos kun siaj lingvoj oficialaj.<sup>7</sup>

Kompreneble la disponebla spaco havas limojn kaj mi haltigas ĉi tie mian retrorigardon. Nun, kiam ni sekvas normale nian vojon kaj povas ĉerpi forton kaj konsilon de niaj pasintaj eraroj kaj sukcesoj, mi proponas rendezuon ĉe la 500a numero. □

---

## NOTOJ

- 1.- 286-287, p.15
- 2.- 253, p. 8
- 3.- 257, p.6
- 4.- 286-287, p. 13
- 5.- 291-292, p. 9
- 6.- 264, p.8
- 7.- 270, p.35

# Kataluna Esperantisto (1910–1936)


Francesc Poblet i Feijoo

Arrecer de l'empenta produïda per la celebració del V Congrés Internacional d'Esperanto del mes de setembre de 1909 a Barcelona, el gener de l'any següent es va fundar la Kataluna Esperantista Federacio (KEF), l'associació esperantista nacional de Catalunya, sota la presidència de Josep M. Terricabras. L'òrgan de què es dotà la Federació va ser la revista *Kataluna Esperantisto* (KE), que veié la llum el mes d'abril del mateix any 1909.

De bon principi, la revista tenia setze pàgines i la seva periodicitat era mensual. El contingut era divers, on destacaven les seccions de notícies del món esperantista, sobretot de l'àmbit lingüístic català, i els temes literaris, amb la inclusió de textos de tots els gèneres, especialment poesia i teatre. També contenia alguna il·lustració, principalment fotografies de grups esperantistes.

La revista es va començar a editar a Sabadell. El primer director de la revista va ser Domènec Sardà i Simó, que morí el juny de 1911. Frederic Pujulà i Vallès el va succeir en el càrrec. La llengua predominant a la publicació era l'esperanto, però sovint també s'escriuven articles en català. La revista comptava amb diversos corresponents per tot el territori i un grapat de col·laboradors habituals entre els quals destacaven, des de bon principi, Joan Amades i Delfí Dalmau.

KE sempre es va fer especial ressò de tots els congressos nacionals catalans amb un ampli cobriment d'aquests esdeveniments, incloent-hi sovint abundant material gràfic. La revista també comença l'any 1912 a organitzar concursos literaris vetllant així, no només pel conreu de l'esperanto i per la coordinació dels seus parlants catalans, sinó també per l'excel·lència de la llengua. Des del juliol de 1912 fins a l'abril de 1914 s'edità un full titulat *Bulteno de "Barcelona Stelo"* que duia per subtítol *Suplemento de "Kataluna Esperantisto"*. El redactor



era Josep Grau i a finals de 1913 apareixia com a *Oficiala Organo de "Barcelona Esperantista Societo"*.

Durant la segona meitat de l'any 1914 KE no va aparèixer per problemes econòmics. La redacció es queixava de la manca de pagament dels socis. A partir de 1915 KE es publicà amb periodicitat bimestral, i posteriorment altre cop mensual, a Barcelona sota la nova direcció de Josep Grau i Casas. El desembre d'aquest any, KE va començar a aparèixer com a òrgan del la Baska Esperanta Federacio –i posteriorment també de la Aragona Esperantista Federacio.



Joan Amades va ser president de la Federació Esperantista Catalana i redactor de nombroses revistes en esperanto.

Això es degué a l'intent d'organitzar una Confederació Esperantista Ibèrica en la qual KEF participava de manera capdavantera. Mentre s'esperava l'edició d'una revista conjunta, que mai veuria la llum, KE va assumir aquest paper suplementari.

El 1916 KE va sortir de manera irregular i l'any següent només va aparèixer un breu número, el 71, per anunciar la mort del Dr. Zamenhof. KE era en aquells moments l'única publicació esperantista catalana. El moviment estava en crisi, com tants d'altres, arran de la consternació que provocà la Gran Guerra.

L'any 1918 es publicà el *Bulteno de la Kataluna Esperanto-Federacio* des de Sabadell, com un intent no gaire reeixit de reactivar la KEF. Al primer número, la redacció feia notar la seva decepció per la davallada del moviment esperantista a Catalunya tot i no ser país bel·ligerant a la Gran Guerra. La publicació estava dirigida per Marian Solà i es prolongà fins el 1920.

KE no va tornar a aparèixer amb la seva capçalera fins el gener de 1921 –mesos després que una nova assemblea de KEF iniciés la reactivació del moviment– amb el número 1 de la segona època, editat a Barcelona, i que es prolonga amb aparició quasi sempre mensual fins al número d'octubre-desembre de l'any 1923. N'assumí la direcció i la redacció en cap Jaume Grau i Casas. La revista va publicar 36 números –alguns de dobles– d'unes dotze pàgines, continuant amb l'estil i els temes de la primera època. Però la publicació estava sotmesa a censura militar i anuncià la seva desaparició a causa d'aquestes pressions i del tancament governatiu de l'Ateneu Enciclopèdic Popular que allotjava la KEF.

Tot i les dificultats econòmiques i polítiques de KEF durant aquest període dictatorial, la Federació va treure tres números (entre el març i el maig de 1924) de *L'esperantista català* (*Kataluna esperantisto, òrgan de la Federació Catalana d'Esperantistes*). El petit butlletí es publicà només en català per reflectir “als ulls dels catalans els progressos de l'Esperanto” i per donar una “prova que, malgrat tot, no és mort l'Esperantisme a Catalunya”. La revista publicà algunes de les obres guardonades als Jocs Florals Internacionals.

I així arribem al juliol de 1924, quan reneix KE amb la seva capçalera històrica, en una tercera època que durarà fins l'any 1928. Se'n publicaren 48 números (alguns eren dobles, altres amb suplementos gràfics) de manera irregular. La redacció tenia seu a Barcelona i en foren directors Jaume Grau i Casas, Sebastià Alberich-Jofré (1926) i Marian Solà (1927), i durant aquesta època Delfí Dalmau sempre en formà part.

Al final de cada any sortien uns fulls suplementaris amb l'índex de continguts, que seguien sent en bona part notícies esperantistes i articles literaris. A partir de 1925 la capçalera va afegir que la revista era també l'òrgan oficial dels Jocs Florals Internacionals.

El català era poc utilitzat però l'orientació de la Federació i de la revista era marcadament catalanista, tot i que no específicament en sentit polític sinó sobretot en sentit cultural i lingüístic. Durant tota la dictadura, KEF, i per extensió KE, van patir una constant persecució per part de les autoritats militars i especialment, de manera personal, d'alguns militars esperantistes espanyols.

El juny de 1928 KEF va rebre l'ordre d'integrar-se a l'associació espanyola i de deixar d'anomenar-se “catalana”. Dos mesos més tard apareixia el darrer número de KE perquè el setembre, al congrés de Vinaròs, els membres de KEF van renunciar a la seva activitat per no haver de doblegar-se a les ordres de la dictadura. Alguns membres s'arronsaren i continuaren l'activitat, sota el nom de Federació Esperantista Catalano-Balear, seguint amb la publicació d'un KE, durant nou números, on va aparèixer per primera vegada el castellà.

El juliol de 1930, ja instaurada la *dictatova* del general Berenguer, es va tornar a publicar KE, i KEF va retornar a les mans dels antics membres. La revista es va reprendre al número 172 (amb periodicitat bimensual i dirigida per Jaume Grau), no reconeixent així els nou butlletins publicats pels col·laboracionistes. La mateixa revista va especificar a la seva primera pàgina com a òrgans oficials i reconeguts de KEF, apareguts fins llavors, els següents 171 números anteriors:

*Kataluna Esperantisto* (primera època):  
números 1-71 (1910-1917)

*Bulteno de la KEF*: números 1-13 (1918-1920)

*Kataluna Esperantisto* (segona època):  
números 1-36 (1921-1923)


*L'esperantista català*: números 1-3 (1924)

*Kataluna Esperantisto* (tercera època):  
números 1-48 (1924-1928)


KE, dirigida de nou per Jaume Grau i Casas, tornà a la seva orientació clàssica com a òrgan coordinador i informador de l'esperantisme català i dels Jocs Florals Internacionals, i s'escriu tant en esperanto com en català. En aquesta quarta època s'editaren 62 números, d'unes 16 pàgines, com sempre amb diversos suplementos, especialment en ocasió dels congressos nacionals. També patí alguna breu aturada, ara per motius estrictament econòmics. Malgrat l'etapa de llibertats que s'encetava, KEF i KE van continuar sota la pressió de l'esperantisme espanyol i de l'esperantisme espanyolista a Catalunya.

El desembre de 1936 KEF va deixar de publicar KE "de manera provisional" per causa de la guerra. La tràgica derrota i la llarga dictadura franquista van fer que aquesta provisionalitat s'estengués fins al juny de 1982 quan KE, en la seva cinquena època, reprengué un cop més el seu camí.

Ultra les endèmiques mancances econòmiques del moviment, la irregular història de KE no és sinó un fidel reflex de la situació de l'esperantisme català i, per extensió, de les llibertats nacionals i democràtiques de Catalunya. Però és també signe de l'arrelament i de la lluita persistent de l'esperantisme a casa nostra. Els milers de pàgines d'excel·lent qualitat que KE ha donat a la llum durant gairebé un segle atzarós de vida, han de ser motiu no només d'orgull per la fecunda i llarga història de l'esperantisme català, que ha vist com se superaven les proves més dures, sinó també de persistència en el treball present i, per què no?, de franca esperança en el futur. □



**dijous 7 de juliol a les 21:30**  
**en el marc de la 1a trobada de música tradicional d'arreu**  
**a VIA FORA! La Farinera (Terrassa del centre cultural)**  
**Gran Via C.C. 837 / Escultors Claperós - Barcelona**  
**entrada gratuïta**



**el 3, 4 i 5 de setembre, muntem la barraca**  
**a la festa major alternativa de Sabadell,**  
**a més de servir birra, oferirem menjars**  
**i begudes com més internacionals millor**

**i l'11 de setembre muntem la paradeta**  
**a la Fira de la Terra, a l'Arc de Triomf**  
**de Barcelona**

# esperanto

## curs intensiu

**Aprèn a parlar-lo en 3 setmanes**  
**els dies 5, 7, 12, 14, 19 i 21 de juliol,**  
**dimarts i dijous, de 19:30 a 21:30**  
**al local de la CNT de Mataró**  
**C/. Nou de Caputxines, 10 bis**

**Cal portar paper, llapis,**  
**ganes d'aprendre**  
**i de passar-s'ho bé**

Grup d'Esperanto  
de Mataró

## 3a Lagado-konkurso

LAGADO (vd KE n-ro 332) estas cerbumiga literpado-ludo. Sube, jen vorto-plena kaĉo en toroida kaldrono dudekkvin-ĉela. Pro tio, vi jam konstatis ke kolonoj dekstra kaj maldekstra kuntuŝiĝas kaj same la linioj supra kaj malsupra. Konsekvence, ĉelo 11 kuntuŝiĝas al 44, 14 al 41, 41 al 14 kaj 44 al 11. En ĝi vi eltrovu plej multajn minimume kvin-literajn Nov-PIVajn kapvortojn. Por tion fari, oni iru de ĉelo en ĉelon laŭ ir-movo de reĝo ŝaka. Tamen, oni ne rajtas eniri plurfoje saman ĉelon en sama kapvorto. Ekzemploj: ŜAMAN (31-21-11-15-14); KOLERA (34-24-25-35-41-32). Notu bone, ke en la suba kaldrono troviĝas 166 validaj senfinaĵaj kapvortoj.

### UNUA KALDRONO

#### Laŭbezone

H+ estas H aŭ Ĥ / S+ estas S aŭ Ŝ

51 Z	52 E	53 H+	54 F	55 E
41 R	42 R	43 A	44 I	45 P
31 S+	32 A	33 K	34 K	35 E
21 A	22 N	23 T	24 O	25 L
11 M	12 K	13 O	14 N	15 A

Konkursanto sendu sep plej valorajn (nepre minimume kvin-literajn) Nov-PIVajn senfinaĵajn kapvortojn eltrovitajn en la kaldrono. Por ĉiu ĝusta solvo oni ricevas kaldronajn poentojn laŭ la longeco de kapvorto, -t.e. laŭ la N-a potenco de du, kie N estas la nombro de literoj de kapvorto. Kapvorto trovita de nur unu konkursanto valoras duoblon. Por instigi la partoprenon, konkursanto premie ricevas 2000 poentojn. Ĉi tiuj poentoj estas enskribitaj en liston, kaj ies poentonombro kreskas, se oni daŭre konkuras. Post ĉiu Konkurso, kiu havas plej altan poentaron, tiu ricevas premion (okaze de egaleco, decidas la alfabeto ordo de familia nomo de konkursantoj) kaj ĝiaj poentoj estas nuligataj. Se premiito denove konkuras, tiam ĝi komencas kun nul poento. Ĉi tiu sistemo ja garantias, ke konkursanto iam gajnos premion, ĉar rekompenco ne dependas de lotumado. Sendu viajn eltrovaĵojn antaŭ la unua de septembro al la ret-adreso [joanramgui@hotmail.com](mailto:joanramgui@hotmail.com) aŭ al Joan Ramon Guiñón i Roset, carrer de Vilamarí 106-108, 08015 Barcelona.

### Solvo de la 2a Lagado-konkurso

En la 2a Kaldrono troviĝas jenaj kapvortoj: AKOLI/- AKOLIT/- AKRIL/- AKRONIM/-AMAZON/- AMITIZ/- AMONI/- AMONIAK/- AMONIT/- APART/- ARION/- ARKOZ/- ATONI/- IMPON/- INTRA/- KAMARIL/- KAMIL/- KAMION/- KAMLOT/- KAMOMIL/- KAOLIN/- KAPITOL/- KAPON/- KAPOT/- KARAT/- KARIN/- KARIOL/- KAROL/- KAROLIN/- KARON/- KARTAM/- KARTON/- KATON/- KLIMAT/- KLORIT/- KOLIMAT/- KOLIN/- KOLIT/- KOLON/- KOLONI/- KOLOR/- KOLTR/- KOMAT/- KOMPAR/- KOMPAT/- KOMPIL/- KOMPON/- KOMPOT/- KOMPTON/- KOOPT/- KOTON/- KRAMP/- KRATON/- KRINOZO/- KRIPT/- KRIPTO/- KRIPTON/- KRITM/- KROAT/- LIMAK/- LIMOZ/- LIPAR/- LITOT/- MAKAON/- MAKARON/- MAKARONI/- MAKOLI/- MAKRAM/- MAKRO/- MAMON/- MAORI/- MARATON/- MARIN/- MARKOT/- MARMOT/- MARMOZ/- MARON/- MARONIT/- MATRON/- MILTON/- MINOR/- MINORK/- MIOZOT/- MIRAKL/- MITOZ/- MONOLIT/- MONTR/- MOZART/- NOMARK/- NORIT/- NOTARI/- OKAPI/- OKARIN/- OLIMP/- ONTARI/- OOLIT/- OOMOT/- ORAKOL/- OTARI/- OTOMI/- PAMIR/- PARAZO/- PAROL/- PARONIM/- PATROL/- PATRON/- PILON/- PILOR/- PILOT/- PIRAM/- PIRAT/- PIROL/- PIRON/- PIROZ/- PITON/- POTIRON/- TAMPON/- TAPIR/- TARIM/- TIMOL/- TIROL/- TOKAT/- TOMAT/- TOPAZ/- TRAKOM/- TRAMP/- TRINK/- TRINOM/- TRITON/- TROIL/- TROLI/- ZAKARI/-

Partoprenis kvar konkursantoj: Grupo Esperanto-Conflent (1024 poentoj): AKRONIM/- KAPITOL/- MAKARONI/- KAMARIL/- KOLIMAT/- KRIPTON/- KAROLIN/-; Christian Pinard (640 poentoj): KOMPAR/- KOMPON/- KAPITOL/- KAMOMIL/- AMONIAK/- KAOLIN/- KAMLOT/-; Hèctor Alòs (448 poentoj): AKRONIM/- KOMPAR/- KOMPOT/-, KOMPON/-, TRITON/-, MITOZ/- PAROL/-; Anonimulo (224 poentoj): TOMAT/- PITON/- KOLOR/- KOLON/- PAROL/- PILOT/- TRINK/- . Por instigi la partoprenon, konkursantoj premie ricevis 2000 poentojn.

Post la 2a Konkurso, la klasifiko estas jena: (1) Hèctor Alòs, 6208 poentoj; (2) Christian Pinard, 5152 poentoj; (3) Grupo Esperanto Conflent, 3024 poentoj; Anonimulo, 2224 poentoj.

GAJNIS PREMION HÈCTOR ALÒS. GRATULOJN !



## Komencantoj: Ĉu Esperantio ĉe Danubo?

Estas lando, kie lernanto povas elekti esperanton en mez-lernejo. En tiu lando, dum la lastaj kvin jaroj, pli ol 22 000 lernantoj parto-prenis ŝtatan **ekzamenon** pri esperanto. Tiu lando estas Hungario.

En Hungario, lernanto devas **ekzameniĝi** pri du eksterlandaj lingvoj por eniri la universitaton, kaj oni povas elekti esperanton, ĉar la ŝtato akceptas, ke ĝi estas viva lingvo. Ankaŭ la universitato rajtigas esperantajn instruistojn per kurso. Danke al tio multaj lernantoj rimarkis, ke esperanto estas pli facila lingvo kaj ke oni lernas ĝin pli rapide. Pro tio esperanto estas la tria lingvo, kiun oni plej multe elektas (post la angla kaj la germana).

Jam en la jaro 1966, kiam okazis la 51a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, la ĉefurba **universitato** starigis esperantan fakon. Fakte, post la dua mondmilito, la ŝtato ne malpermesis la funkciadon de esperantaj asocioj, eĉ mone helpis ilin, malkiel en aliaj socialismaj landoj. Esperanto restis en la publika opinio de la hungaroj.

Hungario **donis** al nia lingvo multajn esperantistojn, inter ili kelkajn gravulojn. Ekzemple Kálmán KALOCSAY famiĝis precipe pro siaj **erotikaj** verkaĵoj. Se vi lernas iomete pli nian lingvon, vi scios kial.

Gerard Escuer

**Doni:** Posedigi.

**Ekzameno:** Lerneja provo.

**Erotika:** Ama.

**Socialismo:** Idearo kaj movado por justeco.

**Universitato:** Supera lernejo.

## Progresantoj: Łužica

La soraba estas lingva insulo en Germanio. Ĝi estas okcident-slava lingvo, kiun oni parolas en la luzaca regiono (sorabe *Łužica*), tio estas en la ŝtatoj de Brandeburgo kaj Saksio.

La soraboj loĝas ekde la jaro 600 post Kristo (pli-malpli) sur lando 100 kilometrojn longa kaj 40 kilometrojn larĝa, en ambaŭ flankoj de la rivero *Spre*, apud Pollando. Ili alvenis en tiun regionon el oriento kaj konstruis kamparan kaj paceman socion. Poste ili ne povis kontraŭstari la militan premon de la germanoj, pro tio ili falis en ilian regionon, sed la soraboj povis ankoraŭ defendi sian kulturalan memstarecon, sian vivmanieron kaj siajn kutimojn.

Mankis sorabaj politikaj **institucioj** dum la 19a jarcento. Sed dum tiu periodo la kulturo disvolviĝis: estiĝis sorabaj gazetoj, libroj, societoj, ktp. Oni ekzorgis pri la lingvo, la literaturo kaj la historio de Luzacio.

Tiu situacio iom post iom ŝanĝiĝis, speciale pro la industriigo, ĉar la soraboj, kiuj tradicie estis kamparanaj, ne partoprenis tiun progreson. Multaj germanoj alvenis en Luzacion por labori kaj kaŭze de tio la dulingveco iĝis necesa, precipe en urboj. Ankaŭ dum la **hitlera** periodo la soraboj estis tre subpremataj. Tamen, la orienta

Germanio subtenis la soraban lingvon kaj nuntempe la registaro **agnoskas** ĝin.

Estas kelkaj mirindaĵoj pri la soraba:

- Nur 55 000 parolantoj nun uzas ĝin en Germanio, sed ankaŭ en iuj teksasaj vilaĝoj (*Lee County*).

- La soraba uzas ne nur la unu-nombrojn kaj multe-nombrojn; ĝi uzas ankaŭ la du-nombrojn, kiam oni parolas pri nur du aferoj.

- Oni skribas ĝin dumaniere laŭ la regiono (alta soraba kaj malalta soraba) sed ĉiam per latinaj literoj.

- La **institucio**, kiu defendas la lingvon, nomiĝas *Domowina*.

- Nuntempe nur ses bazaj kaj ses mezaj lernejoj intruas sorabe kaj aliaj nur parte en ĝi.

La soraba estas tre ligita al la religio kaj al la muziko ĉar per ili oni disvastigis la lingvon tra la popolo. Pro tio ne strangas, ke dancoj kaj kantoj estas parto de la soraba tradicio.

Gerard Escuer

**Agnoski:** Rajtigi.

**Hitlera:** Pri Adolf Hitler.

**Institucio:** Socia aŭ politika organizaĵo.

# Interreta rubriko

*Darío Rodríguez*

**E**dukado.net finis la renovigon de sia retpaĝaro, precipe direktita al instruistoj kaj lernantoj de Esperanto, kun pluraj novaj fakoj, freŝaj novaĵoj kaj diversaj servoj: [www.edukado.net](http://www.edukado.net)

La informejo pri naturkuracado de natukuracisto Harald Schicke, Germanio, startas kun 504 paĝoj. Tiel ĝi supezeble jam estas la plej granda retejo pri naturkuracado en Esperantujo. [www.naturkuracado.info](http://www.naturkuracado.info)

“Solidareco” estas reta revuo pri socialaj kaj laboristaj temoj, eldonata en Koreio: [solidareco.cafe24.com/index.php](http://solidareco.cafe24.com/index.php)

Interesa paĝo pri etimologio de esperantaj vortoj, ankoraŭ en konstruado: [users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/etimo.htm](http://users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/etimo.htm)

La kreinto de la esperanta tekstotraktilo “Simredo”, Klivo Lendon, pretigis pli simplan version, laŭnome “Pentredo”: [www4.vc-net.ne.jp/~klivo/pentredo/](http://www4.vc-net.ne.jp/~klivo/pentredo/)

Ĉu komputilo povas paroli esperante? Esploru tian eblecon per jena interesa paĝo: [users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/sintezo.htm](http://users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/sintezo.htm)

“Litertriso”, nova esperanta ludo de Klivo Lendon, bazita sur la ludoj “Tetris” kaj “Vortaris”, troveblas en: [www4.vc-net.ne.jp/~klivo/litertriso/](http://www4.vc-net.ne.jp/~klivo/litertriso/)

Jena retpaĝaro de W. F. Pilger enhavas interesajn esperantajn vortarojn pri birdoj, mamuloj, insektoj, plantoj, legomoj. Ankaŭ ĝi enhavas liajn librojn “Baza Esperanta Radikaro” kaj “Slango kaj ĵargono en Esperanto”: [www.geocities.com/wfpilger](http://www.geocities.com/wfpilger)

Inter la paĝoj de TEJO troveblas kelkaj dediĉitaj al la voĉa interkomunikilo Skype: [www.tejo.org/uea/Skype](http://www.tejo.org/uea/Skype)

Unu el tiuj paĝoj listigas pli ol 200 esperantistojn kun la pseŭdonimoj necesaj por la telefonado per tiu sistemo, sed neniu kataluno aperas en ĝi: [www.tejo.org/uea/Skajpanoj](http://www.tejo.org/uea/Skajpanoj) □

## Lingva angulo: Reguleco de la radikoj en Esperanto

*Ramon Perera*

**E**sta tradicia plendo, ke la ilo por difinita ago ne ricevas enomon regule formitan. Ekzemple: por *broŝi*, *broŝo* kaj por *balai*, *balailo*. Tiu (ŝajna) malreguleco de la lingvo ĝenas precipe ĉe la instruado. Provizore oni povas diri: tia malperfektaĵo ne estas grava, la lingvo estas sufiĉe utila, do ni ne tro atentu ĝin kaj ludu nian rolon laŭ nia propra kapablo. Kaj ĉar la tuta afero pli tuŝas la senton ol la racion de la homoj, do ankaŭ mi provos tuŝi ilian senton kun la deziro trankviligi la animon kaj faciligi la lernadon.

Unuavide aspektas tre bele kaj loge la ideo “ekestu unue ĉiuj iloj por manlabori kaj poste oni facile ricevos la verbojn per simpla ŝanĝo de -o al -i.” Io tia okazas en la kataluna lingvo kie la ĉiutaga paro estas *escombra* (la ilo) kaj *escombrar* (la verbo) (kaj analoge en la franca *balai* kaj *balayer*). En la kastilia lingvo la verbo (*barrer*) ne rilatas al la ilo (*escoba*), same en la angla: *to sweep* kaj *a broom*. Esperanto naskiĝis laŭ alia plano: en la komenco oni havas stokon da vortoj senkonsidere de ilia gramatika karaktero kaj tiuj vortoj fariĝas kreipovaj per la kunlaboro de la afiksoj.

Kio okazus se oni klopodus ĝeneraligi la regulon: el ilo ĝenerale derivi verbon? Ni prenu la ekzemplon *distili*. La nepra ilo nomiĝas *distililo* aŭ *alambiko*, do ne la ilo nomigas la verbon kaj, krome, estus malfacile ŝanĝi la karakteron de la radikoj, ĉar ĝi enradikiĝis kiel verbo en multaj lingvoj (inter aliaj: angla, franca, germana, itala, kastilia, kataluna, okcitana, pola ktp).

La skemo fariĝas ankoraŭ pli malsimpla, se tri aŭ pliaj substantivoj (radikoj kompletigitaj per -o) rilatas al la sama verbo: la enhavo, la ago kaj la ilo (informo, informado, informilo), kaj tial aŭtomata konkretigo estas neebla.

Kaj eble vi pensas: tamen la radikoj ne estis hazarde prenitaj, sed laŭ ia kriterio. Jes, vi pravas, sed la kriterio taksis ilian internaciecon. Provu asimili la ideon, ke la vera forto de esperanto kuŝas ne en la elektado de la radikoj laŭ ilia gramatika karaktero (Zamenhof tion ne faris), sed en la etna neŭtraleco kaj interna strukturo de la lingvo. □

# Monato


estas kvalita magazino  
por postulemaj legantoj,  
kiuj volas esti funde informataj.

## Jen dek bonaj kialoj por aboni ĝin nun!

- 1) Por **MONATO** raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.
- 2) **MONATO** havigas plej variajn komentojn pri la mondaj novaĵoj.
- 3) En **MONATO** la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vigle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.
- 4) **MONATO** estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.
- 5) **MONATO** plilarĝigas vian spektron de interesiĝo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.
- 6) **MONATO** pligrandigas vian lingvokonon.  
Ĝi estas redaktita en bona hodiaŭa Esperanto.
- 7) **MONATO** jam dum 25 jaroj regule aperadas.
- 8) **MONATO** estas magazino sen amasa reklamo.
- 9) **MONATO** estas la sola revuo, kiu estas ellaborita ekde la redakto ĝis la forsendo, per la kranioj kaj la manoj de esperantistoj.
- 10) Per **MONATO** vi vivtenas kaj subtenas prestiĝan eron en la Esperanto-movado.

... kaj vi kiel nova abonanto nun ricevos **MONATON**  
dum 15 monatoj kontraŭ la prezo de nur unu jaro!

Mendu ĝin ĉe KEA aŭ rete pere de [www.monato.net](http://www.monato.net)!



## Diverses llengües moren ahora

En morir el rei Jirake el passat mes d'abril, va desaparèixer l'últim parlant de totes deu variants de la llengua gran andaman, a l'arxipèlag Andaman, a l'Oceà Índic. Per això, a més dels altres quaranta-nou membres del seu poble, també els investigadors de la universitat Jawahrlal Nehru de Nova Delhi, que compilen un diccionari trilingüe gran andaman-anglès-indi, van rebre una forta sotragada.

Segons informa el diari *The New India Express*, només divuit persones parlen en gran andaman i, després de la mort del rei Jirake, només cinc parlen la llengua amb fluïdesa. Segons la professora Anvita Abbi "Jirake tenia un gran coneixement no només del seu poble sinó també d'altres tribus. Era políglota. El seu pare pertanyia a la tribu Bo i la mare a la Tsari. Aquestes tribus ja han desaparegut, però Jirake coneixia totes dues llengües, a més d'algunes altres, com el *jeru*, el *khora* i el *puçikwar*. Segons la necrologia escrita pel sociolingüista Alok Das, Jirake també dominava el birmà i el *sadari*, parlat també a l'estat indi de Bihar.

Després de salvar-se gairebé miraculosament del tsunami el desembre de 2004, Jirake i els seus vivien en un alberg de

la capital Port Blair, on el visitava el dr. Das. El lingüista explica que, en arribar a l'alberg, es va sorprendre que tothom li volia donar la mà, cosa que el gran-andamans no havien fet mai. Després li van explicar que hom es dóna la mà després d'una defunció.

A. Giridhar Rao / Monato

## La gitanofòbia: una forma de racisme encara acceptada a Europa

"Els prejudicis contra els gitanos indiquen alguna cosa més que un fenomen esporàdic, limitat en el temps i l'espai. Ben al contrari, es tracta d'un fenomen que torna a aparèixer repetidament, existent en diferents graus a tots els països europeus i que avui en dia fins i tot creix en freqüència i abast", deia Maud De Boer-Buquicchio, vicesecretària general del Consell d'Europa durant el Fòrum de Joves Gitanos Europeus, celebrat a Estrasburg el propassat 6 de juny. A Europa hi viuen entre 6 i 8 milions de gitanos com a mínim, especialment a la península balcànica, però també a l'Europa central, a Rússia i altres antigues repúbliques soviètiques.

L'ampliació de la Unió Europea ha posat clarament en l'ordre del dia polític el

tema de la igualtat de drets i la millora de les condicions de vida econòmiques i humanes per al poble romanó. Els països amb més de mig milió de gitanos són Romania, Bulgària, Hongria i l'ex-Iugoslàvia. Amb vora 320.000, Eslovàquia té la major proporció de roms del món.

Malgrat l'ajuda de les institucions europees i de nous programes a gran escala de la Unió Europea, encara se succeeixen accions violentes contra aquesta ètnia. Per exemple, el gener deu joves italians van incendiar un campament on vivien cinc famílies gitanes de Romania, entre les quals hi havia un nadó de nou mesos. Els agressors van explicar la seva acció com un "divertiment de dissabte a la nit".

"La gitanofòbia és una forma de racisme acceptada, estesa i agressiva a Europa" declarava Valeriu Nicolae, director de l'Oficina Romanó Europea d'Informació. "Si no hi ha una reacció decidida de les institucions europees, correm el risc que els més de 8 milions de gitanos d'Europa considerin una hipocresia la cohesió social i la igualtat d'oportunitats, tot i que ambdós són principis bàsics per una Europa unida".

David Ferguson / romnet.hu

# JORNADES D'ESPERANTO

## 16, 17 i 18 de setembre a Barcelona

Unes jornades  
per conèixer  
la interllengua esperanto  
i gent de tot arreu

[www.esperanto-ct.org](http://www.esperanto-ct.org)